Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio

# La Kolombo de Paco

6-a de julio 2021, numero 4

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Kanada Virtuala Kongreso – KvaK-2!

### Rano kvakas. Anaso kvakas. Ĉu ankaŭ vi KvaKas?

**Kiam:**

- Sabaton, la 10-an de julio
- 11h00-13h30 PK (Vankuvero) = 14h00-16h30 ET (Otavo) = 15h00-17h30 (Halifakso)

**Kiel:**

- pere de Zoom (Respondu la 3 demandojn ĉe https://mallonge.net/ey, kaj poste ni sendos al vi la Zoom-ligilon.)

**Kiuj:**

- Kanadaj esperantistoj kaj tiuj, kiuj komprenas, ke temas pri Kanado




*Kanada Virtuala Kongreso!

**Kio:**

- Jessica prezentos kanton.
- Skyler parolos pri sia tra-kanada bicikla vojaĝo.
- Vi babilos kun diversaj esperantistoj tra Kanado.
- KEA proponas strategiojn kaj invitas vian komenton.
- LKK informos pri la venontjara UK en Montrealo.
- Lokaj grupoj tra Kanado prezentos sin.
- KEA respondos demandojn de vi.

**Kial:**

- Vi volas babili kun kanadaj esperantistoj.
- Vi volas ekscii pri kanadaj novaĵoj.
- Vi volas prezenti viajn ideojn.
- Vi volas partopreni la Esperanto-komunaĵon de Kanado

**Kion fari nun:**

- Aliĝu (https://mallonge.net/ey) por ricevi la ligilon.
- Rigardu (sube) la Strategiajn Prioritatojn 2021-2022.
- Pensu pri tio, kion vi deziras de KEA. Preparu demandojn por KEA.
- Pripensu ankaŭ pri tio, kion vi deziras fari por helpi.

**Strategiaj Prioritatoj 2021-2022:**

1. Eldoni "Lumo"-n dufoje jare
2. Organizi du virtualajn kongresojn (KVaK) jare
3. Helpi la organizantojn (kaj starigontojn) de lokaj Esperanto-kluboj en Kanado
4. Pliriĉigi la enhavon de la retejo de KEA
5. Varbi inter esperantistoj kaj ne-esperantistoj (inkl. amaskomunikilojn) por la 107-a UK en Montrealo

## ESF daŭrigas Planlingvajn ekskursojn



Ni invitas vin legi *Kaŝaĵo klare videbla*. Ĝi estas verkita de Simon Davies – la tria en ĉi tiu ege interesa serio de la Planlingvaj ekskursoj.

"Malfacilas scii, ĉu la Antoj estas nacio, religio, sekreta societo aŭ miksaĵo el ĉiuj tri. Ili ŝajne loĝas en la Britaj Insuloj almenaŭ mil jarojn, kaj oni kredas, ke ekzistas inter dek kaj dudek mil el ili, dissemitaj tra la cetera popolo kaj komplete nedistingeblaj de ili."

Jen estas la ligilo:
https://mallonge.net/ez

# La 2-a SK (Sezona Kunveno) de IKEF

IKEF-Estraro


La 2-a SK (Sezona Kunveno) de IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo) okazis la 27-an de junio kun 26 partoprenantoj el Brazilo, Ĉinio, Japanio, Kanado, Mongolio, Nepalo, Rusio, Senegalo, Tanzanio kaj Vjetnamio.

IKEF Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio

La programeroj estis jenaj:

- Saluta kaj enkonduka parolado, s-ro Ĉielismo Wang Tianyi (Ĉinio), Prezidanto de IKEF;
- Konciza prezentado pri la kompanio Xoblas LLC, kiun fondis japana kaj mongola IKEF-anoj, s-ro Yas Kawamura kaj s-ro Chimedtseren Enkhee (prezentinto Yas Kawamura el Japanio);
- Raporto pri aktualaj agadoj de IKEF, s-ro Chimedtseren Enkhee (Mongolio), Vic-ĝenerala sekretario de IKEF;
- Diskuto pri ontaj laboroj de IKEF (fakkunsido dum la 2-a VK la 18-an de julio, la 3-a SK la 26-an de septembro, AMO-Seminario de UEA/IKEF la 28-an de novembro, la 5-a KK (jarkunveno) de IKEF fine de la jaro kaj dimanĉaj kunvenoj. kiuj ebligas diskonigi laborojn kaj produktaĵojn de la filioj kaj membroj… do ni atendas viajn proponojn pri programeroj por la eventoj), s-ro Ĉielismo;
- Konciza prezentado pri IKEF-Mongolio, pri kelkaj mongolaj produktaĵoj kaj pri mongola internacia komerco dum januaro-majo 2021 (kun du videaĵoj), s-ro Enkhee;
- Konkluda parolado kaj fermo, s-ro Ĉielismo;
- Libera babilado, s-ro Enkhee.

Ni sincere dankas ĉiujn partoprenantojn pro la kunlaborado!




# Alvoko al kunmanĝado tra la mondo kadre de la 2-a VK, la 21-an de julio, 2021, 15h-17h UTC

Denove en 2021, kadre de la Virtuala Kongreso de Esperanto, ni okazigas virtuale la kongresan bankedon. Ni kune festu tiun ĉi universalan homan bezonon (manĝi), kiu mirinde donas la eblon plenumi paralele alian nepran bezonon de la homoj: la bezono je interhoma kontakto (kunmanĝi). UEA invitas vin ĉiujn partopreni la aranĝon "Kunmanĝado tra la Mondo", okazontan merkrede, la 21-an de julio, 2021, 15:00-17:00 UTC.

La partoprenantoj montros al la cetera mondo kiel ili festas per manĝado de tipe lokaj aŭ festenaj pladoj en hejma etoso kaj ankaŭ kiel la manĝaĵoj estis preparitaj. La tutmondeco de la partoprenantaro en la Virtuala Kongreso donos la ŝancon sperti plej diversajn manĝaĵojn kaj manĝokutimojn. Ankaŭ ĉar en diversaj mondopartoj estos malsama horo, kelkaj matenmanĝos dum aliaj vespermanĝos kaj tio estas tute konvena, ĉar la tuta virtuala bankedo estos pli bunta kaj interesa.



Proponoj por partopreno en la aranĝo estas bonvenaj ekde nun. La apartaj eroj de tiu ĉi tutmonda festo daŭru averaĝe 5 minutojn. Ili nepre havu viv-elsendotan parton, kie homoj solaj aŭ en familia rondo gustumas la montritan pladon, kiun ili priskribos. La kuiristoj povas ankaŭ antaŭregistri parton de la prezentado, por montri la pretigadon de la manĝaĵoj.

Limdato por sendado de proponoj estas la 10-a de julio 2021. La organizantoj kontaktos la proponintojn tuj post tiu dato por finaranĝi la detalojn. Bonvolu sendi tuj vian manĝoproponon al vk2021@esperanto.org. Bonan apetiton!

# Alvoko por la Oratora Konkurso kadre de la 2-a Virtuala Kongreso



Kiel parto de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) denove okazos Oratora Konkurso por la junularo. Al la 2-a VK daŭre eblas aliĝi: vk.esperanto.net.

La Oratora Konkurso okazos laŭ du sesioj:

- funela sesio (malferma al ĉiuj partoprenantoj): ĝi okazos vendredon, la 16-an de julio, 13:00-17:00 UTC.
- finala sesio: la ĝis kvin plej elstaraj konkursantoj revenos sur la virtualan scenejon la 21-an de julio, merkredon, kadre de la 2-a VK, de la 15:00 ĝis la 16:00 UTC, por decidigi pri la ĝis tri premiotoj.

La konkurso estas malferma al la partopreno de gejunuloj en TEJO-aĝo (malpli ol 36 jaroj), kiuj aliĝis al la 2-a VK. Partopreno estos senpaga, sed la kandidatoj devos skribe anonci sin minimume unu tagon antaŭ la funela sesio al la Komisiono de UEA pri la Oratora Konkurso pere de la membroj Giridhar Rao <rao.giridhar@apu.edu.in> kaj Leandro Abrahão <leandro.brazilo@gmail.com>.

**Por la funela sesio, partoprenantoj devas elekti unu el la jenaj temoj:**

- Dum la pandemio mi surpriziĝis trovi, ke....
- Pro tiu pandemio la afero, kiu definitive ŝanĝiĝis/os en mia vivmaniero, estas....
- Mi memoras, ke en nia lernejo....

**Por la finala sesio, partoprenantoj devas elekti unu el la jenaj temoj:**

- Sen paco kaj konfido la mondo....
- Ne nur paco kaj konfido, sed....

La parolado daŭros ĝis 10 minutojn en la Internacia Lingvo Esperanto. La kandidatoj devas paroli libere, sen anticipe skribita teksto, sed ili povas uzi memorigajn notojn. La paroladojn oni taksos el vidpunktoj enhava, lingva kaj stila kaj laŭ la ĝenerala sinteno de la kandidato kiel oratoro.

La juĝkomisiono ĉi-jare konsistas el: Giridhar Rao (prezidanto), Mark Giraud (membro), Leandro Abrahão (membro kaj teknika prizorganto) kaj Duncan Charters (anstataŭanto). La juĝkomisiono aljuĝos tri premiojn: la unua premio estos senpaga aliĝo al la Universala Kongreso en Montrealo 2022 laŭ kategorio A en la frua aliĝperiodo aŭ 100 eŭroj; la dua premio, 75 eŭroj; kaj la tria, 50 eŭroj (ĉiuj monsumoj liverotaj kiel aĉetkuponoj por la Libroservo de UEA).

La organizantoj bondeziras al la kuraĝuloj, kiuj partoprenos, kaj esperas, ke tiu ĉi kongresero estos tiel populara kaj amase spektata, kiel estas tradicie kaj pasintjare. Kompleta regularo de la konkurso troviĝas en la retejo de UEA. Prepariĝi oni povos i.a. sekvante la kurson de parolarto #forlaflatado senpage ofertata de UEA ĉe udemy.com/course/forlaflatado. Kaj legante la librojn pri retoriko en Esperanto: mallonge.net/retoriko.

*Gazetara Komuniko 960*


---

**Virtuala Somera Esperanto-Studado (SES 2021) sukcese startis. Ĝi estas aŭspiciata de UEA. Vi ankoraŭ povas aliĝi por partopreni kelkajn tagojn ĝis la 7-a de julio.**

***https://ses.ikso.net/2021/eo/***

---

Antaŭ 100 jaroj (la 4-an de julio) mortis Antoni Grabowski (n. 1857). Okaze de la centjariĝo de lia morto, dum la tuta julio la libroservo de UEA ofertas lian epokfaran tradukon *Sinjoro Tadeo* kun sesona rabato sendepende de kvanto: https://katalogo.uea.org/?inf=2956



# Biblioteka Apogo Bachrich 2021: limdato prokrastita al la 31-a de julio 2021

Ĉi-jare UEA disdonos ankoraŭfoje subvenciojn el la Biblioteka Apogo Honore al la geedzoj Johano kaj Maria Bachrich, mallonge nomata Biblioteka Apogo Bachrich, kiu celas pliriĉigon de Esperantaj bibliotekoj, kiuj ne ricevas ŝtatajn, urbajn aŭ aliajn movadajn subvenciojn.



La fondaĵo estis starigita en 2014 de komenca kapitalo (20 000 USD) donacita de la familio Bachrich memore al Johano kaj Maria, venezuelaj esperantistoj forpasintaj en 2005 kaj 2011 respektive. Per la subvencio eblas aĉeti librojn kaj aliajn varojn ĉe la Libroservo de UEA.

En 2020 estis disdonitaj entute 2163 eŭroj al 18 bibliotekoj en Eŭropo (12 bibliotekoj en Belgio, Germanio, Italio, Francio, Rusio, Bulgario, Hispanio, Ĉeĥio), Ameriko (2 bibliotekoj en Brazilo kaj Argentino) kaj Afriko (4 bibliotekoj en Burundo, Benino kaj Ugando).

Ni invitas subvencipetojn de Esperantaj bibliotekoj tutmonde. Por plenigi vian subvencipeton, bonvolu indiki klare la nomon de la respondeca persono, poŝtan adreson al kiu UEA sendu la pakaĵon kaj detalan priskribon de la biblioteko. Bonvolu ankaŭ aldoni kromajn detalojn, kiujn la doganoj de via lando emus peti por sukcese liveri al vi la pakaĵon, (ekz-e retpoŝtadreson, telefonnumeron kaj impostan identigilon de ricevonto). En via komuniko la listo de la mendotaj varoj devas aperi en tabelo, kiu nepre havu la jenon ĉekape de la kolumnoj, ekzakte en la indikita ordo:

| **Titolo** | **Kvanto** | **Baza prezo (€)** | **Sumo (€)** |
|---|---|---|---|

Atentu, ke la titolo kaj la baza prezo devas esti entabeligitaj ekzakte kiel ili aperas en la Katalogo de UEA. Nepre uzu la katalogon, kiam vi preparas vian subvencipeton. Malĝuste preparita tabelo multe malpliigos viajn ŝancojn akiri ajnan subvencion.

La petoj atingu la Asocion ĝis la 31-a de julio 2021 retpoŝte al *bachrich@co.uea.org*, kopie al *oraola@esperanto.org*.

En la pakaĵoj sendotaj ni planas inkluzivigi donacetojn por danki vian partoprenon, inter ili la unuan libron publikigitan de UNESKO en Esperanto: *De ideoj al agoj: 70 jaroj de UNESKO*.




Okaze de duboj pri la pretigo de subvencipeto, bv. ne heziti kontakti la respondeculojn ĉe la supre indikitaj retadresoj.


***Gazetara Komuniko 963***

# Nia Esperanta Trinkejo

## Dima Ŝevĉenko

Reta kunveno, kiu nomiĝas "Nia Esperanta Trinkejo" havis jam 53 sesiojn. Ĝi estis fondita somere de 2020.

© Anna Striganova



Ni babilas, trinkas, drinkas, kantas! Se vi parolas en Esperanto, venu kaj trinku kun ni. Ion ajn: teon, kafon, akvon, bieron, ion ajn kion vi ŝatas, aŭ tute ne trinku. Parolu pri io ajn, sed respektu la aliajn.

**Bonvenon!**

Nun ni kunvenas ĉiusabate. Sekvu la horaron ĉe *https://eventaservo.org*.

Vi povas esti aŭtoro de la *Kolombo de Paco* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*